

komuna organo de KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ KJUŜUA ESPERANTO-LIGO ESPERANTO-LIGO de TYUGOKU kaj SIKOKU

La Movado

komuna organo de KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ KJUŜUA ESPERANTO-LIGO ESPERANTO-LIGO de TYUGOKU kaj SIKOKU

Fondita en 1951 N-ro 861 novembro 2022

komuna organo de:

 KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ
 Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Ôsaka-hu, 561-0802

 KJUŜUA ESPERANTO-LIGO
 2-190, Sisaido, Tarami-tyô, Isahaya-si, Nagasaki, 859-0407,
 MORIWAKI Yasumasa

 ESPERANTO-LIGO de TYUGOKU kaj SIKOKU
 Kannonmen 14-1, Kusiki, Kitanada-tyô, Naruto-si,
 Tokusima-ken, 771-0371, KITANI Tomoko

ENHAVO

| | |
|--|----------------------|
| 第109回日本エスペラント大会、東京の八王子市で…… | 1-2 |
| 楽しい作文教室(135)…… | 塚本 猛 3 |
| Rakontetoj el Hamburgo…… | Mariko AOSHIMA 4 |
| 楽譜: Ruĝa Ĉapo, Blanka Ĉapo (赤い帽子白い帽子) … | 5 |
| 対訳: 源氏物語 第45帖 橋姫 (9) … | 紫式部/belmonto 6-7 |
| Kajero Libervola: Mi ne sufiĉe kapablas aŭdi | |
| …… | Tadaŝi JAMADA 8 |
| 書評: 対訳 Ni vivos! … | 渡辺 克義 9 |
| Montrealo, la ĉi-jara UK-urbo kun mallonga kaj longa | |
| historio … | Maria MARTINEZ 10-11 |
| 日本昔話(19): Pasero sen Lango 舌切り雀 … | 島谷 剛 12 |
| Salono: 書籍で見つけたエスペラント文 … | 竹森 浩俊 13 |
| La Movado: 吹田でふれあい講演会、ザメンホフ祭の予 | |
| 定、広島エスペラント会近況など … | 13 |
| Vortkruca enigmo/ 作文教室成績 /Kurantaj Vortoj … | 14 |
| Mikspoto / 作文教室課題 / KLEG事務局だより … | 15 |
| La 3-a Vintra lernejo 3月に … | 15 |
| Kultura heredajo: 小倉百人一首より … | 15 |
| 編集ノート … | 16 |

第109回日本エスペラント大会、東京の八王子市で

ふたたびハイブリッド方式で行われる

9月23日(金・祝日)～25日(日)の3日間、東京都八王子市の八王子学園都市センターで、第109回日本エスペラント大会が行われた。

オンライン開催は第107回、108回に続いて3度目であり、現地参加とオンラインのハイブリッド開催は107回に続いて2度目となった。過去の技術的・人材的蓄積を生かしながら、数多くのボランティアと東京工科大学スタッフの支援(カメラ撮影、Discordへの書き込みなど)により、充実したハイブリッド開催の大会になった。参加者は397人で、そのうち現地参加は177人であった。

開会式

相川拓也さんのピアノ伴奏によるLa Espero 斉唱、北川郁子日本エスペラント協会理事長、ついで犬丸文雄大会委員長が壇上であいさつ。韓国エスペラント協会会長のSo Jinsuさんはリモートでありさつし、11月に釜山で開かれるアジア・オセアニア大会への参加をよびかけた。八王子市長のメッセージが読み上げられたあと、物故者への黙とうが行われた。司会は川良日郎さん。

公開番組

1日目にはアムステルダム大学教授 Federico Gobboさんの講演「コロナ禍後の新しいコミュニケーション時代とエスペラント」。今後はハイブリッド方式の会合が常識になるだろうということ、若者たちが関心を持っている分野、たとえば自然保護活動にこそエスペラントを役立てるべきという話など、エスペラント運動の展望が語られた。

画面にはあらかじめ録音したGobboさんの明瞭なエスペラントが流れ、画面にはいろいろな人物や光景と同時に、講演の日本語訳が字幕で表示される。講演がひとくぎりついたあと、客席に配られていた紙に書かれた質問が集められ、今度はGobboさん本人がリアルタイムで画面に登場。通訳の木村護郎クリストフさんが聴衆の質問を次々にエスペラントで紹介、Gobboさんの答えを日本語に訳した。

次に行われたのがコンサート。フォーク歌手の野田淳子さんが、「四季の歌」「わたしと小鳥と鈴と」など11曲を、エスペラントと日本語で歌った。野田さんの友人・佐久間順平さんがギターとバイオリ



Federico Gobbo さんと木村護郎クリストフさん



野田淳子さんと佐久間順平さん

んで伴奏し、より深みのあるコンサートになった。

2日目の公開講演は、明治学院大学客員教授の野間秀樹さんによる「なぜ多言語か：複数のことばへの愉しみとエスペラント」。美術、漫画、映画、音楽と多面的に言及しながら、話題は言語に。いくつかの言語を体験してみることは、眼もくらむような楽しいことで、違いを知ることで自分の母語を外から見るができるなど、多言語の学習のメリットが語られた。

新型コロナ流行のさ中でもあり、公開番組だけの参加も、事前登録制になった。公開番組への一般市民の参加は38人にのぼった。

ほかに公開プログラムとして、入門講座と日本エスペラント協会の学力検定試験が行われた。検定試験は2級～4級を11人が受験した。

表彰・報告会

小坂賞の発表があり、山川修一さんが北川理事長から表彰状を受け取った。現代用語辞典などの功績による。

文芸コンクールの発表では、原作部門で堀泰雄さんが2位に、宮沢直人さんが3位に選ばれた。

続いて各地方連盟の紹介。Rondo Harmonia、関西エスペラント連盟、九州連盟など、地方の団体の各代表が活動のようすを報告した。

学習・研究・活動

一般向けの入門講座のほか、参加者のための初級講座・中級講座も行われた。

小坂賞受賞講演をはじめ、研究発表の番組も3日間にわたって行われた。一方、地方からの活動報告による交流も持たれた。

分科会も、趣味・専門・宗教など、幅広い分野で行われた。ただ、数年前までの大会とは違って、同じ時間帯に多数の番組が同時進行ということはな

く、並行番組は検定試験や活動見本市をいれても最高5番組。会場の条件のほか、リモート参加のためのチャンネル数も関係したと思われる。

八王子車人形

演者が車付きの箱にすわり、移動しながらひとりで人形をあやつる、八王子に伝わる郷土芸能。大会では人形劇の説明とともに、有名な演目のさわりが演じられた。

Movada Fairo（活動見本市）

会場の一室には図書売場のほか、14のブースが設けられ、それぞれの団体や個人が書籍、CD、ゲームDVD、エスペラントグッズなどを販売していた。

閉会式

松木義信さんが参加者数などを発表、大会全体をふりかえって報告した。続いて山野裕さん、堀田裕彦さんによる準備期間の経過報告があった。犬丸文雄さんが、大会を支えたLKK (Loka Kongresa Komitato) メンバーを紹介。最後に相川拓也さんのピアノ伴奏でLa Tagiĝoの斉唱をした。今回、大会旗の受け渡しはなかった。司会は佐藤隆介さん。

第110回の大会については、川崎市を主会場とし、どこか他の地域を副会場として、準備や当日の人手を分散させることが提案されている。

オンライン参加のためのツールなど

リモート中継のツールは、ホール番組はZoomが、分科会や入門講座はDiscordが使われた。事前に練習の機会が複数回設けられ、また当日の操作についても、メールによるていねいな案内があったが、それでもとまどう参加者はいたようだ。大会終了後、リモート操作が難しかったという声をあちこちで聞いたが、それぞれ知り合いのエスペランチストに教わったり、できる人が公開番組登録の手続きをが代行したり、助け合って参加にこぎつけていた。



①彼は例会で次のように提案した。

【訳例 1】 En la regula kunsido li proponis jene: (Lumo)

【訳例 2】 Li faris jenan proponon en la regula kunsido. (josie)

【訳例 3】 Li en la regula kunsido proponis jene. (Ivajo)

「例会」は regula (定期的な) と kunsido (会議) や kunveno (集まり) で表現できるでしょう。「提案する」には proponi ion (提案する) が使えます。「次のように」には、注意を引きつける働きのある jen (ほら) を使った jene (次のように) や jena (下記の) が考えられます。

訳例 1 では行末にコロンがあり、この後に説明が続く形になっています。これは proponi の目的語が無く文が不完全なのでピリオドを使わなかったのでしょうか。jene や jeno を使った表現として辞書 PIV にも例文があります。訳例 2 では「次の提案をした」に表現を変えて文を完結させています。

②ご存じの通り次の大会は姫路で開催されます。

【訳例 1】 Kiel vi scias, la sekvanta kongreso okazos en Himeĵi. (Celejo, Eiko)

【訳例 2】 Kiel vi scias, la sekvanta kongreso okazos en la urbo Himeĵi. (Lumo)

【訳例 3】 Kiel vi scias, venonta kongreso okazos en Himeĵi. (CA) ⇨ 解説

「ご存じ」は「知っていらっしゃる」という意味の尊敬語です。あまり尊敬語という意識も無く使うからか、これを反映させた訳例はありませんでした。演説なら estimataj を使う表現も考えられます。

「次の」は sekvanta (次の) や venonta (将来の) が、「大会」は kongreso、「開催される」には okazi (起きる) が使えます。

訳例 2 では固有名詞の「姫路」に la urbo を追加して「姫路」が都市名であると明示しています。

訳例 3 は venonta に la が付いていないため、特定の「次の」ではなく、単にいつか「将来の」大会という意味になると思います。

③開催準備のために実行委員会が必要です。

【訳例 1】 Preparo por okazigo de la kongreso bezonas plenuman komitaton. (Lumo)

【訳例 2】 Por prepari la kongreson la plenumkomitato estas necesa. (Haveno)

【訳例 3】 Por prepari la kongreson necesas organizi loka- kongresan komitaton. (CA) ⇨ 解説

「開催準備」は大会開催のための準備と考えれば aranĝi ion (手配する、準備する) や prepari ion (用意する) で表現できるでしょう。身近な大会の実行委員会では準備と開催の両方を担当しますから preparo kaj okazigo でもいいと思います。

訳例 1 は名詞で preparo por okazigo (開催のための準備) と表現しています。訳例 2 は動詞を使っているため目的語として kongreso (大会) を補っています。目的語に人称代名詞 ĝi を使った訳例がありましたが「姫路で開催される次回大会」を指すなら tioの方がいいのではないのでしょうか。

訳例 3 の loka- は lokan の間違いだと思いますが、loka kongresa komitato (LKK) は主に UEA の世界大会を開催する国の大会実行委員会を指しますので、だいぶ大きな話になっています。

④この会議で実行委員会役員を選出しましょう。

【訳例 1】 En tiu ĉi kunsido, ni elektu membrojn de la plenuma komitato. (Lumo)

【訳例 2】 Jen, ni elektu la komitatanojn en tiu ĉi kunsido. (Ivajo)

【訳例 3】 Ni elektu estraranojn de la plenumkomitato en ĉi tiu kunsido. (Haveno)

「役員」はその役を担当する人、あるいは責任ある人を指します。担当者なら membroj (会員) や anoj (一員)、幹部なら estraranoj (役員) などといえるでしょう。「選出する」は elekti ion (選出する) が使えます。「しましょう」なので動詞には意志法を使うことが考えられます。

訳例 1 は、出席者から委員会のメンバーを選出すると考えて membroj を使っています。訳例 2 は原文に無い jen を追加して臨場感を出しています。直前に「実行委員会」が必要と述べているので、ではさっそく komitatanoj (委員) を選ばおうと言うわけです。訳例 3 は特に責任ある立場の estraranoj (幹部) を選ばおうといっています。他の委員はその幹部たちが指名するのもかも知れません。

成績は p.14、新しい課題は p.15

Rakontetoj el Hamburgo

- Germana Esperanto - Kongreso 2022 -

Mariko AOSHIMA (Germanio)

De la 3a ĝis la 6a de junio okazis denove ĉeesta Germana Esperanto-Kongreso (GEK) kune organizita de Esperanto Nederlando. La programo estis agnoskita kiel kleriga seminario en la kadro de Erasmus+. Entute partoprenis 145 geesperantistoj el Belgio, Danlando, Germanio, Hungario, Italio, Israelo, Nederlando, Norvegio kaj Pollando inkluzive de virtualaj partoprenantoj. Samtempe okazis "KEKSO" (junulara Renkontiĝo) kaj Blinda Esperantista Renkontiĝo en la kadro de GEK. Ĉe la malfermo parolis UEA-prezidanto salutvortojn virtuale.

La kongreso okazis en la nova junulara gastejo de Oldenburgo. Ĝi situas en la nord-okcidenta parto de Malsupra Saksio (Niedersachsen) en Germanio. La kongresejo troviĝis nur 5 minutoj piede de la stacidomo. (foto: sube) Nova moderna junulara gastejo estas kiel hotelo. Oni ricevas la karton anstataŭ la ŝlosilon kaj ĉiuj ĉambroj havas propran banejon kaj televidon. La gastejo estas handikapuloj-facile konstruita.

Oldenburgo estas konata kiel universitata



urbo, bicikla urbo kaj kultura urbo. Troviĝas multaj muzeoj kaj historiaj konstruaĵoj por kulturamantoj, kastelo kaj ĝia granda parko, belaj kanaloj, trinkejoj apud la malnova haveno, preskaŭ unu apud alia.

Kongresa temo estis "daŭripovo". Troviĝis
2022.11



multaj prelegoj pri tiu temo, ekzemple; "Biodiverseco", "Marĉoj", "Akvomastrumado", "Ekonomio de publika bonfarto", "Daŭripova spacekspluatado", "Nacia Parko", "VERDEN", "Volontulado kaj socia daŭripovo" k.t.p. Ili estis tre profesiaj, kelkaj de prelegantoj estas ja profesiuloj pri tiu kampo. Ne nur pri kongresaj temaj prelegoj sed multaj aliaj prelegoj, kunsidoj, aŭtora legado, amuzajoj kaj kunkantadoj abundis. Mi partoprenis en preskaŭ ĉiuj prelegoj pri daŭripovo kaj ĝenerala kunsido de Germana Esperanto-Asocio, bedaŭrinde ne havis tempon por aliaj kunvenoj. Tamen mi trovis tempon por kafe-trinki kaj babili kun aliaj esperantistoj. De tempo al tempo mi aŭdis krokodiladon, ofte estis komencantoj aŭ eĉ eternaj komencintoj (?) Sed ja plejparte bone funkciis esperante paroli.

Ankaŭ oni ofertis en ĉiu posttagmezo diversajn ekskursojn kiel urbo-gvidadojn, promenadon en nacia parko k.t.p. Vespere ni aŭskultis koncertojn de Kajto kaj alia. Por trinkemuloj kaj babilemuloj ne mankis la 24-hore malfermitaj trinkejoj en la kongresejo.

* "ERASMUS+" estas la programo de eŭropa unio por ĝenerala kaj profesia edukado, junuloj kaj sporto.

* "VERDEN" estas la projekto de esperantistoj, subvenciata de la EU-programo Erasmus+ kaj celas antaŭenigi verdajn (ekologiajn) daŭripovajn kutimojn kaj uzi nian lingvon (Esperanton) kaj montri, ke Esperanto eblas trakti seriozajn temojn kaj havi signifikan efikon.

Ruĝa Ĉapo, Blanka Ĉapo (赤い帽子白い帽子)

poez. TAKEUĈI Toŝiko, muz. KAŬAMURA Koojoo, trad. SIMATANI Takesi

5 1) Ru-ĝa ĉa-po, blan-ka ĉa-po, du en a-kom-pan', ĉi-un ta-gon
1 du kna-bi-noj i-ras man'en man'. Sur la dor-soj pe-zas sak'.
Svin-gu ma-nojn en tiktak'. Ĉi-am i-ras du kna-bi-noj, du en a-kom-pan'.



赤い帽子白い帽子

tenejo

作詞 武内俊子 (1905-1945)



作曲 河村光陽 (1897-1946)

- 1) 赤い帽子白い帽子 仲よしさん
いつも通るよ 女の子
ランドセルしょって お手々をふって
いつも通るよ 仲よしさん
- 2) 赤い帽子白い帽子 仲よしさん
いつも駈けてく 草の道
おべんとうさげて お手々をくんで
いつも駈けてく 仲よしさん
- 3) 赤い帽子白い帽子 仲よしさん
いつもたのしい 笑い声
おひより小みち かげぼうしふんで
いつもたのしい 仲よしさん
- 4) 赤い帽子白い帽子 仲よしさん
いつも可愛い 歌い声
黒い靴はいて 赤い靴はいて
いつも可愛い 仲よしさん

Ruĝa Ĉapo, Blanka Ĉapo

poez. Takeuĉi Toŝiko, muz. Kaŭamura Koojoo,
trad. Simatani Takesi

- 1) Ruĝa ĉapo, blanka ĉapo, du en akompan',
ĉiun tagon du knabinoj iras man'en man'.
Sur la dorsoj pezas sak'. Svingu manojn en tiktak'.
Ĉiam iras du knabinoj, du en akompan'.
- 2) Ruĝa ĉapo, blanka ĉapo, du en akompan',
Vojon herban du knabinoj kuras kun elan'.
Kun manĝaĵo en du pak', kun la brako en la brak'
ĉiam kuras du knabinoj, du en akompan'.
- 3) Ruĝa ĉapo, blanka ĉapo, du en akompan',
sin amuzas du knabinoj, ridas kun fratam'.
Suno brilas sur pavim'. Ombron premas jen knabin'.
Ĉiam ridas du knabinoj, du en akompan'.
- 4) Ruĝa ĉapo, blanka ĉapo, du en akompan',
ĉiam ĉarme du knabinoj kantas en sopran'.
Nigras ŝuoj de knabin', ruĝas botoj sur pavim'.
Ĉiam ĉarmas du knabinoj, du en akompan'.



45 La Nimfo de la Ponto – Fasi Fime – (9)

源氏物語 第45帖 橋姫 はしひめ

eljapanigis belmonto

Kavoru multe ekparolis:

"Bone sciante ĝemon de amato, virino ofte afektas nescia pri tio - tio estas kutimo en la socio, sed estos tre bedaŭrinde, ke ankaŭ vi eldiras vanajn vortojn. Vi vivas kune kun la Princo, kiu estas serenspirita en ĉio; do ankaŭ vi travidos ĉion pure. Bonvolu diveni mian elteneblan koron profunda aŭ ne, kiu juĝo fariĝos al mi bona rikolto. Bonvolu lasi min aparte de vulgara voluptemo en la socio. Certe ekzistas tiu homo, kiu forte rekomendas virinon al mi, sed mi estas obstinulo ne obei. Baldaŭ vi ekscios kio mi estas pri tia afero. Mi petas, ke vi aŭskultu miajn diversajn rakontojn melankoliajn, kaj ke ili estu konsolo via, kiu vivas apartigite de la socio. Se vi donos intiman leteron al mi eĉ surprize de via flanko, kiel mi ĝojos!"

Ŝi hezitis kaj malfacilis respondi. Tiam vekite aperis la maljuna ĉambelanino *Ben* kaj la princino cedis parolon al ŝi.

12. *Ben parolas malnovan historion*

Ben riproĉis senhezite:

"Tro estiminde. Kiel malrespekte vi preparis la sidejon! Vi devis inviti lin internen de la bambukurteno. Kiel stulte estas junaj homoj sen scio kiel agi!"

Ŝia maljuna voĉo ankaŭ embarasis la princinojn. Ŝi daŭrigis:

"La Princo kaj ni vivas tre mizere, ne kalkulite en la nombro de vivantoj ekster la socio. Eĉ nepre vizitindaj kaj zorgindaj homoj por konsolo malmultiĝis. Mi elkore dankas pro via neestipova favoro, kaj admiras mirandan viziton. La princinoj, mi kredas, bone komprenas la situacion, sed hezitas

2022.11

「かつ知りながら、うきを知らず顔なるも世のさがと思うたまへ知るを、一ところしもあまりおぼめかせたまふらんこそ、口惜しかるべけれ。あり難う、よろづを思ひすましたる御住まひなどに、たぐひきこえさせたまふ御心の中(うち)は、何ごとも涼しく推しはからればべれば、なほかく忍びあまりはべる深さ浅さのほども分かされたまはんこそかひははべらめ。世の常のすきずきしき筋には思しめし放つべくや。さやうの方は、わざとすすむる人はべりとも、なびくべうもあらぬ心強さになん。おのづから聞こしめしあはするやうもはべりなん。つれづれとのみ過ぐしはべる世の物語も、聞こえさせどころに頼みきこえさせ、また、かく世離れてながめさせたまふらん御心の紛らはしには、さしもおどろかせたたまふばかり聞こえ馴れはべらば、いかに思ふさまにはべらむ」

など多くのたまへば、つつましく答(いら)へにくくて、起こしつる老人(おいびと)の出で来たるにぞゆづりたまふ。

12

たとしへなくさし過ぐして、

「あなかたじけなや。かたはらいたき御座(まし)のさまにもはべるかな。御簾(みす)の内にこそ。若き人々は、もののほど知らぬやうにはべるこそ」など、したたかに言ふ声のさだ過ぎたるも、かたはらいたく君たちは思す。

「いともあやしく世の中に住まひたまふ人の数にもあらぬ御ありさまにて、さもありぬべき人々に、とぶらひ数まへきこえたまふも見え聞こえずのみなりまさりはべるめるに、あり難き御心ざしのほどは、数にもはべらぬ心にも、あさましきまで思ひたまへはべるを、若き御心地にも思し知りながら、聞こえさせたまひにくきにやはべらむ」

paroli en siaj junaj koroj.”

Ŝi estis sentopike lerta paroli senkaŝe kun viroj, kaj sentiĝis tre elstara, kies voĉo sonis gracia.

“Mi timis ke mi ne estis komprenita ĝis nun, sed ĝojas vian aperon nun. Tute fidinda estas ĉi tia ĉiokomprenanto.”

Tiel dirante, *Kavoru* apogis sin al objekto, kies figuron rigardis la ĉambelaninoj inter spacetoj de la vandokurtenoj. Koloroj fariĝis distingeblaj iom post iom laŭ matenlumiĝo, kaj ili trovis lin vestita en sporta vesto kaŝige deformita kaj tre malsekigita de rosoj. Tiu figuro forte lanĉis bonan odoron plena en la ĉambro kontraŭe, kio supozigis la odoron de la sukavato.

Jen ĉi tiu maljunulino ekploris:

“Mi forte tenas min, por ke mi ne estu riproĉita pro maldiskreteco, sed mi deziris rakonti mirindan historion iam en bona ŝanco. Tion mi preĝis kune kun la volo al la sukavato, ke mi sciigos al vi eĉ pecon el ĝi. Tiu preĝo efikis kaj plenumiĝis la deziro por mia ĝojo. Sed jam larmoj vualis miajn okulojn antaŭ ol ekparoli, kaj mi ne povas eldiri.”

Ŝia figuro ŝajnis tre trista pri io. Li konis, ke maljuniĝinta homo estas facile larmema entute, sed dubis, kial ŝi severe malĝojas. Li diris:

“Mi jam vizitis ĉi tiun vilaon multajn fojojn. Mi ne sciis la ekziston de bona komprenanto pri subtila sentimento kiel vi, kaj survoje mi sola malsekiĝis de rosoj kaj larmoj. Jen estas ĝojiga ŝanco; eldiru ĉion, restigante nenion.”

“Vere nun estas la unika ŝanco. Eĉ se estus la alia, mia vivodaŭro ne estas certa, nefidinda eĉ dum nokto al morgaŭo.

(daŭrigota)

と、いとつつみなくもの馴れたるもなま憎きものから、けはひいたう人めきて、よしある声なれば、

「いとたづきも知らぬ心地しつるに、うれしき御けはひにこそ。何ごとも、げに思ひ知りたまひける頼み、こよなかりけり」

とて、よりみたまへるを、几帳のそばより見れば、曙(あけぼの)のやうやうものの色分かるに、げにやつしたまへると見ゆる狩衣(かりぎぬ)姿のいと濡れしめりたるほど、うたてこの世のほかの匂ひにやと、あやしきまで薫(かを)り満ちたり。

この老人(おいびと)はうち泣きぬ。

「さし過ぎたる罪もや、と思ふたまへ忍ぶれど、あはれなる昔の御物語の、いかならむついでにうち出できこえさせ、片はしをもほのめかし知るしめさせむと、年ごろ念誦(ねんず)のついでにもうちまぜ思ふたまへわたる験(しるし)にや、うれしきをりにはべるを、まだきにおぼほればべる涙にくれて、えこそ聞こえさせずはべりけれ」

と、うちわななく気色、まことにいみじくもの悲しと思へり。おほかた、さだ過ぎたる人は涙もろなるものとは見聞きたまへど、いとかうしも思へるもあやしうなりたまひて、

「ここにかく参ることはたび重(かさ)なりぬるを、かくあはれ知りたまへる人もなくてこそ、露けき道のほどに独(ひと)りのみそぼちつれ。うれしきついでなめるを、言(こと)な残いたまひそかし」
とのたまへば、

「かかるついでしもはべらじかし。また、はべりとも、夜の間(ま)のほど知らぬ命の頼むべきにもはべらぬを。

(続く)

音楽愛好者にとって、聴覚の障害は致命的なことです。しかし、いまではいろいろと新しく開発された機器によって老年性難聴者も人生を楽しんでいます。

Nuntempe mi malfacile aŭdas najbaron. Por aŭskulti parolon pli bone mi kutime aldonas mian manon al la orelo. Prudenta najbaro ripete kaj pli laŭte diras tuj apud mia orelo. Eble estas tiel, ke mi pli facile aŭdus en silenta senbrua ĉambro, sed estas pli malfacile mi aŭdas en brua stacidomo kaj en veturanta tramo.

Mi ofte bedaŭras ke miaj oreloj estas nekapablaj distingi vortojn de la prelegantoj kaj mi ne bone komprenas kion li parolas. Mi ne havas kuraĝon meze de lia parolado ekstari kaj plendi lin por ke li parolu pli laŭte. Ĉar lia voĉo estus normala, dum mia aŭdo malforta.

Iam mi vizitis muzikkoncerton. Mia bileto gvidis min al la seĝo de balkono. Sed tie mi aŭdis nur malbone muziksonon de piano kaj kantado. Kial tiel malagrabla? Eble pro mia seĝo de la balkono. Post unu programero, trovinte vakan seĝon, kiun neniu okupis, mi iris malsupren kaj okupis la seĝon sur la planko. Kantisto kun pianisto ekludis, sed denove mi aŭdis nur misakordan, misharmonian, mistonan muzikon.

En tiuj tagoj hejme mi ofte aŭskultis klasikajn muzikojn. Miaj amplifiko kaj paroliloj estas novaj por nuntempe registritaj muzikoj. Sed vane la novaj aparatoj ne respondas al miaj oreloj por ĝui belan muziksonon.

Iam vespere en Esperanto-kunveno mi ekkantis simplan kanton, tiam mia edzino ĉesigis min dirante, ke mia kantado estis ekstertono. Kial? Mi komprenis, ke miaj oreloj mem aŭdis mian kantadon misakorda

aŭ mis-harmonia. Mi rezulte ekkonis min ke mia aŭdkapablo mal-helpis kanti laŭ ĝusta tono.

Nun mi pensas pri la muzikisto Betoveno. Komponente Simfonion la Naŭan, li direktis simfonian orkestron. Tiujn jarojn li vivis izolita pro la surdeco, kaj kiam la orkestro finis lastan ludon, aplaŭdo estis forta kaj longa, sed la direktanto Betoveno ne sciis, kiam orkestro finiĝis. Tiam juna solisto prenis lian manon kaj turnis lin al la aŭskultantoj, kiuj ĉiuj staris kun aplaŭdo.



Baldaŭ mi studis pri surdeco kaj serĉis aŭdaparaton. Ekzameninte min pri aŭdkapablo per aparato kun komputilo, la konsilanto de la vendejo proponis al mi paron de eta aparato. Kapaŭskultiloj por televido bone helpas min, sed kiam ĝi funkcias, televido estas muta por mia edzino. Mi invente aranĝis por du kanaloj, kiu interligiĝas senkable kun mia saĝtelefono.

Moderna aŭdaparato estas multekosta, sed interkonvenas kun aplika programo en saĝtelefono por doni ekvalizon laŭ aŭdkapablo: fortigi/malfortigi sopranan aŭ basan tonon por ĝui muzikon. Por bone aŭdi prelegon mi metu telefonon sur la prelegtablo kaj fore sidu kun la aparato en miaj oreloj. Kaj hejme tro laŭta televido ne ĝenas mian edzinon. Antaŭ komputilo kun Zoom-kunsidantoj, mi aŭdas ilin pli bone ol ĉe reala kunsido. Ĉar mia kapaŭdilo el komputilo rekte prenas ilian voĉon, kiun ili parolas tuj antaŭ sia mikrofono de la aparato.

Fine mi devas diri, ke la aparato ne estas perfekta. Eĉ multekosta aparato ne donas ĉiaman Junecon. Dum via Juneco aŭskultu belan muzikon kaj pepadon de birdoj kaj zumadon de insektoj.

対訳 NI VIVOS!

渡辺 克義 (新潟県)

ユリアン・モデスト著、恵那学習会〔黒柳文字・黒柳吉隆・斎木彰・斎木昌代・藤本日出子・山田義〕訳『対訳 私たちは生きる! Ni vivos!』(恵那学習会、2022年)

リディア・ザメンホフ(1904-42)はルドヴィク・ザメンホフ(1859-1917)の末娘で、父の死後、エスペラント普及に一族で最も熱心であったことで知られる。本書は、リディアの最晩年を、その周囲も描写し、戯曲の形にまとめあげたものである¹。

作者はブルガリアの人気エスペラント作家ユリアン・モデスト²(1952年生、本名 Georgi Mihalkov)で、原著は1982年に刊行されている。本欄で取りあげる日本版はその対訳本(偶数頁がエスペラント、奇数頁がその邦訳)である。原著に *Dokumenta dramopri la lastaj jaroj el la vivo de Lidia Zamenhof* (下線は評者による) という副題が付けられていることから窺い知れるように、虚構部分はあるがドキュメンタリー性を重視して仕上げられた一冊である。

エスペラントとエスペランティストを過度に美化することなく、エスペラントの現状と将来像に悲観的なエスペランティストがいたこともストレートに書いている。法律家の David (Dawid) Dembski (架空の人物だと思われる) にこう語らせている。「Ĉu vi ankoraŭ kredas, ke se iu germana soldato iam lernis Esperanton, li ne murdas nin per tiu sama mano, per kiu iam li trafoliumis la Esperantan lernolibron? Esperanto estis granda iluzio kaj ni ne rajtas mensogi al tiu knabo. Li devas jam reale rigardi la vivon, tiel, kiel ĉiutage li rigardas la morton. / もし、ドイツ兵の誰かがエスペラントを学習したなら、そのドイツ兵は学習書を開いたその同じ手でわれわれを殺すことなどありえないだろうと、まだ信じているのですか³。エスペラントは大なる幻想ですよ。この少年に偽りを話すなんて許されません。彼は、死を毎日見ているように、もう、現実を生きることを考えるべきです」(118-119頁)。

作品は、観客に向けたリディアの次の感動的な独白で締め括られる。「Eble la morto ne estos tiel terura. Ni mortos, sed novaj homoj venos. Ili ne forgesu pri la forto kaj la volo, per kiuj ni laboris, kredis kaj vivis. / 死ぬことは怖くありません

La Movado 861

ん。私たちは死んで行きます、でも新しい人たちが来ます。その人たちには、私たちが努力し信じ生きて来た力と志を忘れないでほしいのです」(132-133頁)。

リディアには救出の手が差し伸べられていたにもかかわらず、彼女がそれに応じようとした気配はない。その理由についてはいろいろと考えられているが、どれもいまひとつ説得力を欠く。エスペラントを後世に伝えようとするならば、生きのびるという選択肢もあったはずである。リディアが生き抜くことに“消極的”であった理由については、詳細は不明だ。

最後に、エスペラント普及の観点から本作品を考えてみたい。上演するとなれば、日本語の場合でもセミプロ以上の演技力が要求されるだろう。アマチュアではかなり難しいのではなかろうか。エスペラントでということになれば、佐々木孝丸⁴クラスの俳優が数名必要になる。邦訳は全般に正確なのだが、生硬な箇所がないわけではない。実際に舞台上で用いるためには、科白の推敲が欠かせない。長文ではとくに、修飾・被修飾語の関係が瞬時に理解することが難しくなるので、表現を工夫することが求められる。本書を全国の大小様々な劇団(一部の大学の演劇サークルも対象となろう)に発送し、上演を働きかけたならば、関心を示す集団が必ずいくつか出てくるはずである。上演が実現したならば、エスペラント普及の点でも効果は大きいだろう。誰かがいつか気づいてくれるだろうという、座して手を拱いているだけでいいだろうか。

1. 作品の背景の理解には、Wendy Heller, *LIDIA: The Life of Lidia Zamenhof: Daughter of Esperanto*, Oxford, 1985 / 水野義明訳『リディア エスペラントの娘 リディア・ザメンホフの生涯』(近代文藝社、1994) / Lidia. *La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto*, trad. Bernhard Westerhoff, Antverpeno, 2007 が有益である。
2. モデストの邦訳作品にはほかに、大島順子・野原エミ・松木義信・武藤たつこ訳『夢の狩人』(ネクパブ・オーザーズ・プレス出版、2021)がある。
3. 岡一太作「緑の星の下に」(1953)では、これとは対照的な展開となる。
4. 1898-1986。エスペランティスト、俳優、プロレタリア作家、演出家、翻訳者など、多方面で活躍した。佐々木については、砂古口早苗著『起て、飢えたるものよ <インターナショナル>を訳詞した怪優・佐々木孝丸』(現代書館、2016)を参照のこと。

Montrealo, la ĉi-jara UK-urbo kun mallonga kaj longa historio

Maria Lourdes MARTINEZ kaj Thomas KLEEMANN
(Germanio)

En Nordameriko historio de cent jaroj jam estas longa, diras proverbo. Verdire, la historio de Norda Ameriko estas multe pli aĝa ol la 300-400 jaroj ekde kiam eŭropanoj daŭre komencis setli en Norda Ameriko. Antaŭ dek miloj da jaroj popoloj ĉasante bizonojn kaj aliajn bestojn sekvis la migradon de bestoj de Azio trans la Beringa Istmo al Ameriko kaj komencis elkovri la Amerikan kontinenton de nordo al sudo kaj de okcidento al oriento. Antaŭ ol francaj kaj britaj migrantoj ekde la 16-a kaj 17-a jarcento alvenis kaj fondis Montrealon – franclingve “reĝa monto” – sub la verda reĝa monteto, jam 600 jarojn antaŭe vikingoj trovis Kanadon kaj setlis tie por kelka tempo. La klimataj kondiĉoj por la unuaj setlantoj estis severaj kaj ankoraŭ hodiaŭ la vintroj estas malvarmegaj kun temperaturoj regule sub -20 gradoj kaj someroj kun pli ol +30 gradoj. Tiel konstruiĝis tuta subtera urbo en la centro de la urbo por agrabla vintra kaj somera butikumado.

La ĉi-jara UK(Universala Kongreso) konsciigis pri la grava antaŭeŭropa historio, kio vidiĝis en la elekto de la kongresa temo, ekskursoj por sperti indiĝenan kulturon kaj muzikeroj dum la nacia vespero. La impona nacia vespero sekvis la kulturalan evoluon kaj komencis kun indiĝena muziko, sekvis inuita gorĝa kanto, franca dancgrupo kaj irland-skotaj kantoj. Fine ĉio kulminis en komuna muzikado simbolanta la hodiaŭan kunvivadon de diversaj kulturoj en Kanado. La kongresa temo traktis la temon de indiĝenaj popoloj kaj ĝiaj rajtoj al konserviĝo kaj evoluigo de sia kulturo. La temo ankaŭ estis elektita omaĝe al la iniciato de UN kaj UNESCO, kiu deklamis la venontajn dek jarojn “la jardeko de indiĝenaj lingvoj” emfazante la rajton de indiĝenaj popoloj je tero kaj kulturo por disvolviĝo. Malgraŭ

la bonvolo subteni tiujn bazajn rajtojn montriĝis, ke tio malfacilas ĉar ekzemple la tuta Ameriko laŭ tiu principo devus esti redonita al la indiĝenaj popoloj. Ĉu eble same Ainuaj popoloj devus rricevi la Nordan parton de Japanio?

Kiel estis la etoso de la UK en Montrealo? Inter la proksimume 800 aliĝintoj nur parto de esperantistoj povis partopreni la UK-on, iuj ne ricevis vizon, aliaj ne venis pro manko de vakcinoj kontraŭ la kronviruso kio estis deviga por eniri la landon. Certe malhelpis ankaŭ la altaj vojaĝ- kaj restadkosto. Tiel kanadanoj kaj usonanoj estis la plej granda Esperanto-grupo dume ni sentis la mankon ekzemple de japanaj Esperantistoj kaj precipe de Kansajaj Esperantistoj. El Aŭstralio/Ocenario neniu venis, dum el Afrika kontinento almenaŭ unu Esperantisto ĉeestis, alportante la mesaĝon ke Afrikaj Esperantistoj tre avide atendas UK-on en sia kontinento en 2024. Memkompreneble ni ankaŭ sopiras tian historian eventon. Rimarkinde estas ke inter la partoprenantoj ĉeestis novuloj kiuj lernis Esperanton interrete pere de Duolingo, aplikaĵo por lerni fremdajn lingvojn, kaj aliaj junaj Esperantistoj, kiuj famiĝis en la Esperanta interreto per jutuba aktivado.

Elstara programero dum UK estis teatra prezentaĵo pri la unua Zamenhofa vojaĝo al la 6-a UK okazinta 1910 en Vaŝingtono kaj posta vizito al Montrealo. Pere de rakontoj prezentitaj de la nuntempa kasisto de la Loka Kongresa Komitato Garry Evans, kiu montris neatenditan altnivelan kapablecon de teatrumado, ni spektantoj povis retravivi la imponan kaj impresigan vojaĝon de Zamenhof en Esperanta karavano ŝipvojaĝante al Ameriko. La tiama UK estis forte inspirita kaj regata de la ĉe-esto de majstro Zamenhof, kiun la Esperanto-adeptoj fervore honoris kaj adoris. Same la registaroj de diversaj ŝtatoj sendis altrangajn reprezentantojn kaj entuziasme deziris saluti Zamenhof en Esperanto. Oni sentis la fortan evoluantan ondon tra la mondo sur kiu rajdis Esperanto en tiu epoko.

Partoprenis ankaŭ ne invitita gasto ĉe UK, unue kaŝe sed pli kaj pli evidente, nome la kronviruso kiu infektiĝis pli kaj pli da kongresanoj. Okazis ke kelkaj devis resti dum preskaŭ la tuta kongresa semajno en kvaranteno kun kataraj kaj gripaj simptomoj.

La kongresurbo Montrealo en Kebekio (Kanado), kvazaŭ franca enklavo meze de la anglalingva mondo, havas unu aferon komunan kun Japanio. Ĝi ne videblas unuavide tuj, sed ĝi estas vera insulo meze de la rivero Sankta Laŭrenco. La urbo Montrealo estas moderna kaj diverseca urbo. Videblas kvartaloj de multaj kulturoj, aldone al la franca kaj irlandana-skota ekzistas interalie ĉinaj, italaj, judaj, grekaj kaj aliaj kvartaloj. Ĉiuj enmigrintoj donis sian stampon al la urbo. Eĉ geja kvartalo ekzistas. La urbo Montrealo estas urbo de festoj. Dum la UK semajno okazis geja parado, festo de Otaku (junuloj aspektante kiel Manga- kaj Anime-figuroj), murpentraĵa konkurso kaj aliaj kulturaj spektakloj. Aliflanke en Montrealo vidiĝas ankaŭ sociaj problemoj kun multaj povruloj vivante surstrate. Kelkparte oni sentas ke Kanado estas la 51-a Usona ŝtato. Tion okulfrappe substrekas la maniero de pago en Kanado, ĉu en restoracio, kafejo aŭ taksio. Al la prezo indikita aldoniĝas devige trinkmono por la servo, 18% por malbona servo, 20% por averaĝa servo kaj 22% por bona servo. Imagu ke kelkloke oni devas antaŭpagi la servon. Ekzemple mendante kafon en kafejo oni antaŭpagas la kafon kaj la ricevotan servon. Ni ne kuraĝis mendi kafon kun malbona servo, sed certe estus interese kielmaniere ĝi estus servata.

Konatiĝi kun alia lando signifas ankaŭ konatiĝi kun ĝiaj manĝaĵoj kaj bongustaĵoj. Tiucele ni vizitis unu el la plej grandaj bazaroj en Montrealo, nome la “Marché Jean-Talon”, kiu estas granda kamparana bazaro en norda distrikto de Montrealo. Ni estis tre impresitaj de la varieco de lokaj produktoj, ĉar ĝi ankaŭ montras kiom grava manĝaĵo estas rigardata en

la lando. Tiu bazaro vere kaptis nian intereson jam dum la unua vizito, ke ni revizitis ĝin plurfoje. La fruktoj kaj legomoj estis tie traktitaj kun vera amo kaj respekto. Oni povis vidi, ke la legomoj kaj fruktoj estis prezentitaj en rondaj korboj. Tio aspektis tre alloga kaj stimulis la apetiton. Simile prezentiĝas en Japanio, ĉu ne? Dum Nordameriko ne estas mondfama pro sia bona manĝaĵo, ni havas nenion krom bonaj aferoj por rakonti pri nia impresoj pri Montrealo. Ni sentis nin tie kiel fiŝo en akvo. Tio en ambaŭ sencoj, ĉar la fiŝoj kaj marnutraĵoj, kiujn ni elektis por manĝi, venis de la proksima najbareco. Do, la bona kebeka kaj internacia kuirejo ne povis malkontentigi nin. Feliĉe! Aldone ni speciale ŝatis la sovaĝajn mirtelojn ankaŭ kiel marmelado aŭ en mafinoj kaj la oksikokoj [ツルコケモモ] por matenmanĝo. Simpla, sed tre nutra kaj bongustega estas la dolĉa maizo, per kio indiĝenoj jam regalis la unuajn eŭropanojn. Laste sed ne malpli gravaj estas la diversaj freŝaj fiŝoj kaj marnutraĵoj, kiuj venas de la proksima Atlantika Maro. La fiŝoj estas tiom bongustaj ke eŭskaj fiŝkaptistoj jam ekde multaj jarcentoj venadas al Kanada maro. Hodiaŭ oni supozas ke same kiel la vikingoj eŭskaj fiŝkaptistoj multe pli frue ol la unuaj eŭropaj enmigrintoj en la 16-a jarcento jam konis pri Ameriko. Ili bone gardis tiun sekreton, ĉar fiŝkaptistoj ja ne malkaŝas siajn bonajn fiŝejojn.

編集部注：Beringa Istmo は氷期の「ベーリング海峡」



清水博子さん提供の絵葉書：Salutojn el Montrealo

Pasero sen Lango

rerakontis SIMATANI Takesi

Antaŭ multaj jaroj iam kaj ie vivis maljunulo, kiu ame bredis paseron. Iun tagon dum forestis la maljunulo lia edzino faris amelon el kuirita rizo. Dum ŝi malatentis la pasero formanĝis la amelon. Furioza la maljunulino fortranĉis langon al la pasero kaj forpeligis ĝin.

Ŝi diris al la maljunulo reveninta. "Malsaĝa pasero formanĝis valoran amelon kaj mi tranĉis la langon kaj forpeligis ĝin." Li malĝojis kaj eliris serĉi la paseron. "Kie estas la pasero sen lango? Kie estas la pasero sen lango?"

Kiam li iris en bambuejojn, oni pepis al li. "Kara Avĉjo, mi estas ĉi tie, pep', pep'!" La pasero vivis en sia gepatra domo. Ĉe la familio li estis bonvena kaj varme akceptita.

Je lia foriro la pasero diris. "Kara Avĉjo, reiru kun nia donaco. Bonvolu elekti inter granda kaj malgranda bambuaj kofroj." La maljunulo respondis. "Pardonon, mi ĝenas vin! Jam kaduka mi ne elportos la grandan. Danke mi reiros kun via malgranda kofro."


La maljunulo revenis hejmen kaj malfermis la malgrandan kofron, el kiu aperis trezoroj. Lia edzino mokis lin kaj diris. "Malsaĝa vi estas! Kial vi ne elektis la grandan? Nun mi iru kaj revenu kun la granda kofro." Ŝi iris kriante. "Kie estas la pasero sen lango? Kie estas la pasero sen lango?"

Kiam Ŝi iris en bambuejojn, oni pepis al ŝi. "Kara Avinjo, mi estas ĉi tie, pep', pep'!" La maljunulino eniris la domon de paseroj kaj postulis regalon. Ĉion formanĝinte ŝi diris. "Mi reiru hejmen pro aferoj. Donaco al mi estu granda bambua kofro!"

Kun la granda kofro ŝi reiris montaran vojon. Ju pli ŝi marŝis des pli peza fariĝis la kofro. Fine ŝi haltis kaj eksidis survoje. La maljunulino miris kaj malfermis la kofron. El la kofro elvenis multe da serpentoj kaj fantomoj kaj ŝi svenis.

2022.11

舌切り雀

島谷 剛 再話 

昔々、あるところに大切に雀を飼っているおじいさんがいました。ある日、おじいさんの留守に、おばあさんがご飯を練って、洗濯糊をつくりました。おばあさんが目を離れた隙に、雀がおばあさんの糊を食べてしまいました。おばあさんはとても怒って、雀の舌を切って家から追い出しました。

おじいさんが帰ってくると、おばあさんは、「バカ雀が大切な糊を食べてしまったので舌を切って追い出しましたよ」と言いました。おじいさんはとても悲しみ、雀の行方をさがしに行きました。「舌を切られた雀はどこじゃ、舌を切られた雀はどこじゃ」

竹林の中に入ってゆくと、「おじいさん、私はここですよ、ちゅんちゅん」という声がします。雀は家族の家に帰っていました。雀の家族はおじいさんを歓迎しました。

おじいさんが帰るとき、雀は言いました。「おじいさん、どうかおみやげを持って帰ってください。大きいつづらと小さいつづらとありますが、どちらがいいですか」「それはすまないね。私は年寄りだから重いつづらは持てない。小さいつづらをいただきます」

おじいさんが自分の家に帰ってつづらを開けると、中から宝物が出てきました。話を聞いたおばあさんは、「バカなおじいさんだね。なんで大きなつづらを買わなかったんだ。どれ、私が行って大きなつづらを買ってこよう」と言って出かけました。「舌を切られた雀はどこじゃ、舌を切られた雀はどこじゃ」

竹林の中に入ってゆくと、「おばあさん、私はここですよ、ちゅんちゅん」という声がします。おばあさんは雀の家に上がり込むと、ごちそうを催促しました。食べるだけ食べると「どれ、忙しいから帰るとしよう。おみやげは大きいつづらにしておくれ」と言いました。

おばあさんは大きなつづらを背負って山道を下ってゆきました。ところが歩いているうちに、背中をつづらがだんだん重くなってきました。とうとう歩けなくなって、道の上に座り込みました。おばあさんは不思議に思っつづらを開けてみました。中から蛇や妖怪がいっぱい飛び出してきて、おばあさんは気を失いました。



書籍で見つけたエスペラント文

竹森 浩俊 (奈良県)

真藤順丈の『ものがたりの賊(やから)』の中でエスペラント文を偶然発見。1906年、東京の市内電車焼き討ち事件から物語は始まる。

謎の翁(実は竹取の翁、讃岐の造(みやつこ))が、教師を辞めて鉄道会社の技士となった坊ちゃんにエスペラントで話しかける。「ぼうなん、べすぺろん、みあのもえすたすさぬきのみやつこ」、「さるとん、みでのうべ、れんこんていじす」

ひらがなで表記されているが正しいエスペラントと理解できる。坊ちゃんはエスペラント文「らるな、えすたすべら」(=“La luna estas bela.”)を初めて聞いて、石鹼水でのろくさい泡玉(シャボン)を作るような言葉と感想を持つが、やがてこの言葉がア

ナキストの間で流行っているエスペラントであると気づく。

この小説は、物語の登場人物(夏目漱石の坊ちゃん、竹取物語の竹取の翁、源氏物語の六条院=光源氏、伊豆の踊子の薫、山月記の李徴、高野聖の聖、大菩薩峠の机龍之介など)が1923年の関東大震災直後の未曾有の大惨事に立ち向かう話。大杉栄や崇徳院など歴史上の人物も登場し、日本近代文学史が実際の歴史に入り込む、荒唐無稽、時空を超えたエンタテイメント小説。エスペラントは444ページ中、最初の6ページ程度の頻出で、大杉栄と竹取の翁との関連をエスペラント文の引用で示したものである。ウィキペディアによれば、大杉栄は1905年にエスペラントを知り、同年から翌年にかけて東京市本郷でエスペラント学校を開いたとのこと。竹取の翁は大杉栄の下でエスペラントを習ったという設定だろう。

La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La

吹田エスペラントふれあい講演会

11月3日(木・祝) 13時~16時、吹田市文化会館メシアター小ホール。講師：藤田美保さん(NPO「コクレオの森」代表理事)。[←大畑 賀代子]

ザメンホフ祭の予定

近江、京都、宇治城陽、枚方

11月27日(日) 午後、京都エスペラント会館。

神戸・はりま

12月10日(土) 13時~17時、兵庫県立播磨生活創造センター(JR加古川駅南徒歩5分)。

大阪・堺・富田林・奈良・和歌山

12月11日(日) 13時半~16時半、堺市総合福祉会館第3会議室(南海高野線堺東駅700m)。

池田・茨木・吹田・高槻・豊中

12月18日(日) 13時~17時、池田中央公民館。

はりま、関西大会実行委員会立ち上げ

第71回関西エスペラント大会は2023年6月3日4日に「イーグレひめじ」(姫路城の南)で開催する。大会テーマは「歴史と文化のまち姫路でつむぐエスペラントの思い」“La ideo de Esperanto ŝpinata en Himeji, historia kaj kultura”。

La Movado 861

はりまエスペラント会は、関西エスペラント連盟(KLEG)の協力も得て、6月30日に関西エスペラント大会の実行委員会を設立した。8月4日第2回目は会場、テーマを決定した。

当日、一般公開講演を依頼していた能楽師、江崎欽次郎さんも同席し、より細かい打ち合わせを行った。江崎さんは2015年江崎家当主を継承し、12世欽次郎を襲名。演題(仮)「姫路城とお殿様」。ご当地ソングの「高砂や」を中心に話す。また、ご当地の「なんちゃんず」のコンサートを依頼している。

前回62回の姫路での大会は姫路城が工事中だったが、今回は新しくよみがえった姫路城を見ることができる。大勢の参加をお待ちする。[←多田 龍二]

広島エスペラント会9月前半

9月7日(水)、広島エスペラントセンターで初級講習会。講習生2人。自己紹介を練習し、ドリル式エスペラント入門を学習した。9月7日(水)、14日(水)10時からZoomで中級学習会。“Pasporto al la tuta mondo”。6人参加(内二人は岡山から参加)。9月4日、11日、日曜日例会。5人がZoom参加した。テーマは「秋」「お月見」。栗や柿の思い出、短歌も教わり有意義なParoladoだった。[←野原 エミ]


Vortkruca enigmo

TAKEMORI Hirotoŝi

Vicigu adekvate 10 literojn trovitajn en la kvadratetoj kun stelo. Tiam vi akiros nomon de floro, kiu estis utiligita kiel la temo de japana poezio ekde la 10-a jarcento.

Sendu la trovitan vorton kiel solvon de la enigmo ĝis la 20-a de novembro, paperpoŝte al la oficejo de KLEG, aŭ retroŝte al <lamovado@gmail.com>.

Rimarko: (x) signifas, ke la vorto ne portas finaĵon.



Horizontale: 1. ~ de amo: Hanako diris al Taro ke ŝi amas lin. 7. Ŝi iras ~ universitato. (x) 8. Li drinkis kaj estis ~a. (x) 10. Ŝi ~ amas lin. 12. Li havas 60 jarojn kaj ĝuas ~n. 15. Li ~is lampon kaj legis la tutan nokton.(x) 17. ~ la ĝardeno belaj floroj floras.(x) 18. ~ moviĝas malantaŭ la kurteno. 19. Mallongigo de poŝtmarko. 20. Ŝi estas ~ulo, ĉar ŝi kutime legas la Novan Testamenton.(x) 21. Ŝi ĉiam ~as la ŝatatan fontoplumon.(x) 22. Li aĉetis vespermanĝon ĉe grand~a vendo.(x) 24. Li volis malimpliki la implikitajn ~ojn.(x) 26. Dek ok dividite per ~ estas ses.(x) 28. Ili estas kamaradoj de la sama Esperanto-~.

Vertikale: 1. Kvarrada ĉevaltirata veturilo. 2022.11

(x) 2. Pli ~ mil homoj ĉeestis en la funebra ceremonio.(x) 3. La stela standardo jam ~as en vent'.(x) 4. La naŭa monato. 5. Naŭ kvin~ estas kvardek kvin. 6. Nun ~ kantu a, b, c.(x) 9. Skriba klarigo pri preparado de manĝaĵo, trinkaĵo aŭ ia teknikaĵo.(x) 10. Se homo volas sidiĝi sur ĉevalon, li kutime metas ~n sur ĝia dorso. 11. ~ kaj vi estas Esperantistoj.(x) 13. Grava greno kune kun rizo kaj tritiko. 14. ~ diras ke ili estas amantoj.(x) 19. Ŝiaj ge~oj lasis ŝin edziniĝi al li.(x) 21. Ambaŭ staris en milito ~ al la alia.(x) 23. La ~a vorto, "Kamuj" signifas diaĵojn aŭ medion.(x) 25. Ĉi jaro estas ~mil ~dek ~.(x) 27. Tradicia japana arto kun maskoj kaj luksaj kostumoj, kie fantomoj ofte aperas.(x)

La solvo al la septembra enigmo: MELONGENO

La ĝustan solvon donis 11 legantoj:

武藤 たつこ、

CA、

濱田 國貞、

Sayuri、

松川 まきこ、

島津 泰子、

TADA、

本田 照美、

Grebo、

にしのりこ、

Kacu



Kurantaj Vortoj

チャールズ 3 世 Karlo la 3-a

エリザベス 2 世 Elizabeta la 2-a

ジェット (宝石) gagato

楽しい作文教室 (135) 成績

10人の方から応募がありました。() 内は留意事項です。

うん、良いね: Lumo, Haveno, Ivajo, CA。

良いね: josie, Eiko, ハルちゃん (② urubo ④ kardo), Drako, Celejo (④ elektru), Jasuko (④ prenum...).

Mikspoto (当欄は敬称略)

★山川修一著『日エス現代用語集』第4版(収録語数9000)が完成し、日本エスペラント協会(JED)会員サイトから無償でダウンロードできるようになっている。 [←山川修一]

★11月12日(土)に明治大学国際日本学部山脇ゼミが中野区役所から助成を受けて多文化共生イベント「ちえるあるこ」(エスペラントで虹)を開催する。 [←後藤 斉]

第94回九州エスペラント大会

2022年11月27日(日)にオンライン開催。

第21回中国・四国エスペラント大会

11月27日～12月18日 毎日曜日、
20時～21時の4日間、オンラインで開催。

楽しい作文教室1月号課題(11月20日締切)

- ①なぜか私は一人舗装された道路を歩いていた。
 - ②その道路や家々にはなんとなく見覚えがある。
 - ③やがて大きな川に架かる橋にさしかかった。
 - ④その橋は建設中でまだ半分しかできていない。
- (ヒント) 舗装 pavimo. koni, veni, iel を調べましょう。原文の内容を伝えるには言い換えも必要かもしれません。

送付先:

[郵送] 〒674-0092 明石市二見町東二見 515-1-811 塚本 猛

[電子メール] c_tak@esperanto.ne.jp
(件名に「作文」の文字を入れてください)

添削は受け付けておりませんのでご了承ください。

La 3a Vintra Lernejo 3月に

コロナも落ち着き始めたようなので合宿を企画しました。2023年3月25日～26日に神戸市北区「しあわせの村」で開催します(三宮駅などからバス利用)。

10～20人の参加を見込んで会場を予約しました。授業のあとは温泉でくつろぎ、宴会(希望者)でたのしい交流を。詳しくは次号で案内します。

授業は25日午後2室、26日午前2室を準備しています。授業のコマ数などこれから検討しますが、エスペラント訳『方丈記』を熟読吟味するクラス、人前でプレゼンテーションするクラス、エスペラント運動について討論する分科会などが組上に上がっています。

第10回アジア・オセアニア大会

11月3日(木)～6日(日)
韓国、釜山

KLEG 事務局だより

★第70回関西エスペラント大会の記念品のCD
“Ĵunko kantas Esperante”

の歌詞に誤りがありましたので、訂正後の歌詞を大会の Raporto に同封しました。

★大会記念品とは別にご購入いただいた方は、ご面倒をお掛けしますが、関西エスペラント連盟のホームページからダウンロードしてください。

[http://www.kleg.org/kek/kek70/Jxunko%20kantas%20Esperante\(Reviziita\).pdf](http://www.kleg.org/kek/kek70/Jxunko%20kantas%20Esperante(Reviziita).pdf)

★ザメンホフ祭で購入したい書籍・CDがありましたら、できるだけ早く事務局にご連絡ください。取り寄せます。

kultura heredaĵo

tradukita al Esperanto

小倉百人一首 Cent Versis Utaon





tradukis SIMATANI Takesi



ちはやぶる
神代もきかず
竜田川
からくれなゐに
水くくるとは

(17 在原業平 825-880) 秋

Nun certe miras
eĉ la dioj fortunaj:
En la Tacuta,
la fluo karmezinas
pro folioj aŭtunaj! (Ariŭara no Narihira)



★ 新刊・新着 ★

Esperanto por mi 5 500円
 画家ヘルガが描いた、野田淳子、間宮緑、Michela Lipari、Claude Nourmontらエスペランチストの肖像と本人のエッセー。A4判、16p.

Raportoj el Japanio 25 1500円
 堀泰雄の「報告」最新刊。ウクライナ情勢、福島や足尾の訪問記、島崎敏一の手紙、世界のトイレ見聞録など内容は多彩。A5判、224p.

Lerni e-legante 3100円
 ŝtupoj al pli vasta vortprovizo—36章のテーマに沿って1400の単語を学ぶ。写真やイラストも豊富。グループにおすすめ。B5判、172p.

★ 学び、深めるエスペラント ★

エスペラント 日本語を話すあなたに 880円
 藤巻謙一著。日本語と比較しながらエスペラントを概観する。新しい視点で学ぶエスペラント。

エスペラント中級独習 2200円
 藤巻謙一著。通信講座指導の成果を活かした練習メニュー満載。朗読CD(MP3形式)付き。

エスペラント文法の散歩道 1000円
 「単数か複数か」「いろいろなde」「laの用法」など文法知識の整理と活用に(改訂新版)。

エスペラント運動を考ふる—La Movado 誌から 1000円
 本誌掲載の論説56編を収録(峰芳隆編)。運動の現在と将来を考えるための好個の一冊。

★ ザメンホフに親しむ ★

Fundamento de Esperanto 2700円
 「エスペラントの基礎」5か国語版+解題、解説。

Ekzercoj de Zamenhof 300円
 「エスペラント基本文例集」。ザメンホフの「Ekzercoj」と「La Feino」を初心者のために再編集。

Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia 600円
 ザメンホフによるエスペラントの原点を示す論文。

国際共通語の思想 1650円
 水野義明編訳。ザメンホフの主要論文と大会演説を収録。

★ 画家ヘルガが描くエスペランチスト ★

Esperanto por mi 2 500円

Esperanto por mi 3 500円

ご注文は郵便、ファクス、電子メールで。送料は実費。現品と一緒に請求書を送ります。支払いは振替口座で。

編集ノート



★ 屋外ではマスクをはずして、といわれてもだれもマスクを手放しません。2019年までの世界は過去となり、二度と戻ってこないのでしょうか？

★ 関西エスペラント連盟(KLEG)は3月に神戸の裏山、六甲山の裏側で合宿を企画しています。果敢な参加者を募集しています。(島谷剛)

編集部宛連絡・投稿は<lamovado@gmail.com>へ

発行所：ラ・モバード社 編集：相川節子 発行人：染川隆俊 定価280円 送料63円 1年3800円 送料共本局：一般社団法人 関西エスペラント連盟内 561-0802 豊中市曾根東町1-11-46-204
 電話(06)6841-1928 ファクス専用(06)6841-1955 電子メール：esperanto@kleg.org
 振替口座 00960-1-60436「一般社団法人 関西エスペラント連盟」 ホームページ：http://www.kleg.org
 九州支局：九州エスペラント連盟内 859-0407 長崎県諫早市多良見町シーサイド2-190 盛脇保昌方 電話(0957)43-4352
 中国四国支局：中国四国エスペラント連盟内 771-0371 徳島県鳴門市北灘町櫛木字観音面14-1 木谷奉子方 電話(088)688-1098